starto

Organo de Ĉeĥa E-Asocio - Orgán Českého esperantského svazu

Jaro tria N-ro 6 Novembro-Decembro 1970

# ANTAŬ OKDEK JAROJ ...



S-ano Th.Čejka

Antaŭ mi kuŝas la unua lernolibro de Esperanto skribita por ĉeĥoj de František Vladimír L o r e n z /1872-1957/. Eta libreto, 27-paĝa, kies titolpaĝo en ambaŭ lingvoj tekstas: "Úplná učebnice mezinárodní řeči dra.Esperanta. Napsal Fr.Vl.L.- Plena lernolibro de la lingvo internacia de dro. Esperanto.Por Bohemoj skribis Fr.Vl.L.- V Pardubicích.Tiskem firmy F.Hoblík.-Nákladem vlastním.1890."

Antaŭ 80 jaroj klarigis la 18-jara Lorenz en la antaŭparolo motivojn,pro kiuj li prezentas al siaj samnacianoj unuan lernolibron de Esperanto.Sekvas "plena gramatiko" kaj specimenaj tekstoj,kiuj inkluzivas tradukojn - verŝajne la unuajn - el la lingvoj ĉeĥa kaj slovaka : poemoj "La libro de l' naturo" de B.Jablonský,"La vero de J.Kollár,traduko de "Kde domov můj?" /"Ho,kie hejm"; ĉeĥa nacia himno-rim.de red./kaj Esperanto-ĉeĥa vortareto. La sorto estis nefavora al la verketo de Lorenz : sole kelkaj unuopuloj ekstudis laŭ ĝi la lingvon zamenhofan.

Nur en 1900 verkis Theodor Č e j k a /1878-1957/kunlabore kun V.Bilík kaj J.Holub,kaj propra riske eldonis en Bystřice pod Hostýnem detalan lernolibron de Esperanto kun la vortaroj ĉeĥa-Esperanta kaj Esperanto-ĉeĥa,kiu signifis komencon de la organizita Esperanto movado inter la ĉeĥoj.

Jam en la jaro 1901 estiĝis la plej malnova esperantista societo en Ĉeĥoslovakio kaj en la iama Aŭstrujo-Hungarujo,"La Unua Aŭstria Societo Esperantista" en Brno.

Antaŭ sepdek jaroj,dank'al la lernolibro de Čejka,startis la ĉeĥa Esperanto movado,kiu depost tiam nelacigeble propagandis,disvastigadis kaj praktikis la internacian lingvon Esperanto.

D-ro V.Novobilský CSc

# Zasedalo 5. plénum ČES

Dosud nejpočetněji obeslané plenární zasedání ÚV Českého esperantského svazu se konalo ve dnech 21-22.11.t.r.v bývalém Radiopaláci v Praze na Vinohradech.

Zprávu o činnosti svazu za uplynulé období od 4.7.1970 přednesl předseda ČES Josef Vítek.Kladně zhodnotil dosavadní práci členů ústředního výboru a sekretariátu,který i přes nedostatek vhodných místností pracoval úspěšně.

Členství ČES v UEA se již podařilo realizovat i po stránce finanční.Příspěvky byly poukázány prostřednictvím obchodní banky do Rotterdamu.Členské průkazy UEA rozešle sekretariát počátkem r. 1971.

Tajemník P.Polnický předložil návrh rozpočtu svazu na příští rok.Počet přihlášených členů ČES dosáhne vbrzku čísla 2000. Nejbližším cílem je získat alespoň 2500 členů.

Účastníci zasedání schválili většinou hlasů přijetí Klubu esperantistů v Praze do svazu jako místní skupiny s právní subjektivitou.

K bodu o ediční činnosti plénum projednalo možnosti vydání dalších pomůcek, překladů a specializovaných textů.Svazový orgán STARTO vyjde v příštím roce osmkrát.Nezbytně je třeba rozšířit síť spolupracovníků a kontakt s místními skupinami.Připravuje se m.j. výbor z českých autorů s obsahem zaměřeným k 50.výročí KSČ. V zájmu evidence a dokumentace je nutno,aby každý kroužek dodal sekretariátu svazu po jednom výtisku z publikací vydaných ve své režii.

K účasti na zahraničních akcích v roce 1971 byli navrženi J.Vítek a ing.V.Kočvara /56.Světový esp.kongres v Londýně/a ing. Fr. Sviták a P.Polnický /Setkání zástupců esp.svazů socialistických zemí v Berlíně/.

Plénum schválilo program akcí na následující rok /jde zejména o oslavu 70.výročí EK v Brně a setkání českých a slovenských esperantistů ve Vsetíně/ a výhledově se zabývalo i přípravou sjezdu Českého esperantského svazu v roce 1972.

Příští zasedání pléna bude 13.-14.března opět v Praze. /knl/

---

## SABOTÁŽ POD JMÉNEM "GLOBO"

Naši členové dostali několik čísel ručně rozmnožovaného zpravodaje "Globo"(Koule). Tento zpravodaj vychází anonymně bez udání místa a redaktora. Neobyčejně špatné esperanto a neznalost základních faktů ze současného života Českého esperantského svazu ukazuje,že autor stojí zřejmě již delší dobu mimo esperantskou organizaci: to potvrzuje i jeho kritika některých politických chyb někdejšího ČSEV. Autor neví nic o politických opatřeních ČES, neví nic o práci komunistů v ČES.

Je téměř s podivem,že někdo, komu - podle jeho vlastních slov - záleží na správném zaměření esperantského hnutí u nás,nepřijde se svými radami a kritikami přímo mezi nás, a uchyluje se k rozšiřování anonymních zpravodajů. Anebo je v tom úmysl? Spoléhá on,který zřejmě v posledních letech prstem nehnul pro hnutí,že bude povolán,aby nad ním dělal vrchního dozorce? Dnes se za funkce v esperantském hnutí neplatí a manýry pravicového oportunismu či novotnovského dogmatismu nemají v našem hnutí místo.

Závěrem bychom těmto samozvaným soudcům ocitovali dvě věty z úvodníku RP ze dne 21.10.t.r.: "Vyskytli se dokonce takoví,kteří se cítí být povoláni k tomu,aby "to" teď,v roce 1970 "vyčistili",protože k tomu prý mají"morální oprávnění",jež zdánlivě získali tím,že se v letech 1968-69"ničeho"nedopustili. Kritiku konservativismu vydávají za kritiku "levice",aby křikem o jednotě zastírali své vlastní narušování jednoty."

## *Ze života kroužků*

**HAVLÍČKŮV BROD** - Po letošním úspěšném seriálu diapozitivů z Francie přichází EK při ZK ČSD s nabídkou dalších : o Samarkandu a Havl.Brodě s komentářem českým a esperantským.

**KYJOV** - Zdejší EK při SZK pod předsednictvím A.Jandíka zahájil nové kursy pro začátečníky v Kyjově a Vlkoši. Propagaci esperanta velice prospěla přednáška předsedy KE v Praze dr.Horského na téma "Komenský a dnešek", proslovená 12.listopadu za účasti téměř 100 osob. Před přednáškou se sešli esperantisté z Brna,Bučovic a Hodonína k přátelské výměně zkušeností.

**OSTRAVA** - EK při DK VŽKG se na výroční členské schůzi zavázal,že získá dalších 15 členů do konce roku 1970, čímž by se jejich počet zvýšil na rovných sto.

K letošním vánocům a Novému roku připravuje kroužek nové vydání barevných pohlednic s vánočními motivy a esp.textem.

**PARDUBICE** - Na 323 míst do pětaosmdesáti zemí rozeslali pardubičtí esperantisté nedávno vydaný prospekt o svém městě. Jejich záslužnou propagační práci ocenil i tamní Kulturní dům.

**PÍSEK** - Esp.kroužek "La ponto" při KP ROH Jitex zahájil v říjnu kursy esperanta pro pokročilé podle učebnice W.Aulda "Paŝoj al plena posedo". Písecký kroužek je pravděpodobně zatím jediný v republice,který používá této vynikající pomůcky při hromadném vyučování.

Dvacet členů kroužku strávilo v letních měsících společnou rekreaci spojenou s vlastivědnými vycházkami po Šumavě. V říjnu kroužek hostil po pět dnů dvojici esperantistů z Karl-Marx-Stadtu.

**VSETÍN** - Kroužek pořádá pravidelné pondělní besedy pro veřejnost ;v příštím roce se zaměří hlavně na prohloubení družby se slovenskými,polskými a maďarskými esperantisty,s nimiž navázal dobré styky.

## OSOBNÍ KRONIKA

Klement U r b a n,člen KE v Praze, pedagog a autor zeměpisných příruček, se 22.listopadu dožil svých devadesátých narozenin.

Miloslav S t a n ě k,člen KE v Praze, zemřel 30.září ve věku 63 let.

Inž.Jaroslav A d a m e c, člen EK v Brně,zakončil s vynikajícím prospěchem studium na strojní fakultě a byl promován 20.října.

## LA MONDO RAKONTAS

**Mezinárodní čítanka T.Kiliana "La mondo rakontas",kterou vydal Klub esperantistů v Třebíči,obsahuje 50 pohádek a povídek ze všech světadílů.Navazuje na "ABC" a je vhodnou pomůckou pro pokročilé,a samozřejmě i vítaným dárkem pro přátele v zahraničí.Cena výtisku 8 Kčs.Při odběru 10 ks je jedenáctý zdarma.**

**Zatím jediná učebnice, která vyjde v dohledné době,je"ABC mezinárodního jazyka" T. Kiliana. Její vydání připravuje Třebíč na únor. Kroužky,objednejte si ji včas !**

## KLUB ESPERANTISTŮ V PRAZE

**vydá v roce 1971 dvě knížky:esperantský překlad již rozebrané "Cesty do Španěl" prof.dr.R. Horského a vědeckofantastické povídky Josefa Nesvadby.Obě publikace budou vytištěny ofsetovou technikou,v omezeném nákladu.Přibližná cena 10 Kčs.**

## ESPERANTSKO-SLOVENSKÝ A SLOVENSKO-ESPERANTSKÝ SLOVNÍK

**St.R.Seemana vydá v nejbližší době Pedagogické nakladatelstvo, Bratislava. Slovník má asi 840 stran. Zájemcům v českých zemích jej opatří kterékoliv knihkupectví.**

# Plialtigi nian lingvoscion

• La Lingva Komisiono de PS jam eklaboris.S-ano Vuk Echtner,prezidanto,kaj inĝ.Eduard Felix,sekretario,eldonis ĉe tiu okazo proklamon,el kiu ni citas kelkajn ideojn :"Unuaprincipe LK gardestaros por nia lingva pureco kaj perfekteco.En la nunaj cirkonstancoj la LK povos funkcii ĉefe kiel lingva konsilantaro rekomendanta studmaterialon pri la problemoj prezentataj - kaj ankaŭ kiel lingva polico por ĈEA,kies aŭtoritatecon kun laŭbezona plenuma povo la LK volas aspiri por malhelpi lingvofuŝaĵon.Tamen,pilorii la LK ne volas.

La LK alvokas jam ĉe sia unua publika apero la ĉeĥajn esperantistojn kontroli sian uzadon de Esperanto,pensi konstante pri la riĉigo de sia lingvoscio.En la Jaro de Eduko ni pensu pri nia propra sin-edukado !"

• La Ekzamena Komisiono de PS preparas la unuan ekzamen-limdaton por printempo 1971.Okazos ekzamenoj pri scio kaj tiuj pri kapableco instrui Esperanton.Pliajn informojn petu ĉe la sekretario J. Chvosta,Engelsova 289,Poděbrady.

• Laboroj pri nova ampleksa ĉeĥa-Esperanta vortaro startis sub la gvido de d-ro Černý.Urĝe estas serĉataj kunlaborantoj,kiuj posedu:1/Plenan Vortaron kun Suplemento,2/ĉeĥan vortaron de Váša-Trávníček el 1952,3/ laŭeble plej diversajn E-vortarojn de specialaj fakoj. Interesatoj tuj aliĝu al Kroužek esperantistů při OKH Komuna v Mostě/d-ro J. Černý,kluba prezidanto/.

• Kun ĝojo ni konstatas,ke multaj grupoj preparis solenajn programojn omaĝe al J.A. Komenský. Membroj de PS publikigis en-kaj eksterlande plurajn artikolojn kaj prezentis prelegojn pri la mondfama pensulo. V.N.

## FONDITA TEKNIKA BIBLIOGRAFIO

Teknikista sekcio de ĈEA fondis "Bibliografio de teknikaj verkoj en Esperanto",per kiu oni deziras helpi en terminologia aktiveco kaj establi realan bazon por utiligadi almenaŭ limigitan nombron da fakaj publikaĵoj en la internacia lingvo.

Kunlaborontoj,informu la peranton /Inĝ.Vlastimil Kočvara, Leninova 84,Opava,ČSSR/per"notaĵo" pri novaj teknikaj verkoj en Esperanto en kontraktita sfero.Oni sekvos librojn, artikolojn,firmaan literaturon, manuskriptojn.

## ČAPEK EN ESPERANTA BLINDULREVUO

La Esp.fako de la ĉeĥa por blindula revuo "Zora" eldonis 110 paĝan brajlepresitan binditan libron kun Esperantaj tradukoj el K.Čapek.Ĝi estas senpage sendata al eksterlandaj legantoj de "Aŭroro",okaze de ĝia 50-jara jubileo.Ĉeĥaj interesitoj povas ricevi la libron post pago de Kčs 12.

La 9-an de oktobro okazis festkunveno de nevidanta kaj malforte vidanta junularo en granda salono de la restoracio sur la "Slovanský ostrov"-insulo en Praha.Ĉeestis pli ol sesdek gejunuloj.La ĉefpunkto de la kunveno estis informa parolado pri Esperanto;prezentis s-ano V.Echtner. Ĝi estis organizita kunlabore inter la Blindul-Sekcio de ĈEA kaj la Ĉeĥa Blindul-Ligo.

Novaj interesitoj pri la internacia lingvo plejparte aliĝos al la skriba Esperanto-kurso ĉe la blindula revuo "Zora".

POŠTAJN ĈS.TARIFOJN POR EKSTERLANDO eldonis M.Rybín,Štúrova 26/e,Lipt.Mikuláš,SSR.

## Venontjare denove en Mělník

Sunbrila dimanĉo,la 8-an de novembro,allogis al la ĉijara renkontiĝo en la fama urbo de la ĉeĥa vino M ě l n í k proksimume220 esperantistojn el ĉiuj partoj de la Ĉeĥa respubliko,krom unu reprezentanto el GDR kaj 5-membra grupo el Aŭstrio.

Bonvenigaj vortoj,informoj de la asocia prezidanto kaj ceteraj programeroj dum solena tagmanĝo en la granda salono de la kastela vinejo estis nur kelkminutaj,ĉar la ĉefa celo estis doni al ĉiuj eblecon paroli kaj kontaktiĝi reciproke. Tamen,la tuta tago - kiu inkluzivis ankaŭ ekskurson en la ĉirkaŭaĵon - pasis tro rapide kaj oni nur malvolonte forlasadis la tri ekskursajn aŭtobusojn kaj multajn aŭtomobilojn por reciproke certigi sin per la vortoj : "Post unu jaro denove en Mělník ni revidos nin!"

Speciale agrablaj estis pluraj telegramoj,leteroj kaj salutkartoj,inter ili tiuj de la gvidantoj de la slovaka movado,de la KKS -UEA ktp.

/jelĉ/

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EL OKCIDENTBOHEMIA REGIONO okazis la 22-an de novembro en Klenčí sub Čerchov.La partoprenintoj vizitis la lokan muzeon kaj la monumenton de la ĉeĥa verkisto J. Š. Baar. La aranĝon aŭspiciis Distrikta Kleriga Domo en Domažlice,EK en Bor apud Tachov kaj La rondeto de la amikoj de Esperanto ĉe la Kleriga Klubo en Díly. /k/

## Kolektu esp. dokumentojn pri Komenský

La Pedagogia Muzeo de J.A.Komenský en Praha transprenis de mi kiel donacon binditajn volumojn de jarkolektoj de E-revuoj el la jaroj 1957-1970,kie aperis miaj tradukitaj aŭ originalaj artikoloj pri Komenský,kaj vicigis ilin en sian bibliotekon. Temas pri "Nuntempa Bulgario", "La Suda Stelo","Norda Prismo", "Heroldo de Esperanto", "Oomoto" kaj aliaj. Por ĉio mi ricevis dankleteron rekone al mia laboro pere de Esperanto.Ĝi estas samtempe rekono de Esperanto kiel lingvo adekvata al la aliaj.

Samtempe estas petataj ĉiuj, kiuj iam verkis aŭ verkas, ev. tradukas artikolojn pri Komenský,sendi la koncernajn revuojn al jena adreso :

Pedagogické muzeum J.A.Komenského,dr.J.Štraus,Valdštejnský palác,Praha 1,Valdštejnské n.4

Krome mi estis petita de dro Novobilský sendi al li la liston de ĉiuj miaj ellaboraĵoj pri Komenský por lia bibliografio, kiun li ĵus kompilas,do - faru same kiel mi !

Jana Cíchová

---

LA KUBA EDUKMINISTERIO nun esploras proponon instruigi la internacian lingvon Esperanto "en ĉiuj lernejoj kaj uniuniversitatoj" de la lando. Se la propono efektiviĝus,Kubo estus la unua ŝtato,kiu instruigas la lingvon en ĉiuj siaj lernejoj.

ESTONA RADIO septembre disaŭdigis la unuan programon en Esperanto. Per tio Sovetunio iĝas la 10-a lando nuntempe disaŭdiganta regulajn radio-elsendojn en Esperanto.

LA UNIVERSITATO FORT LAUDERDALE decidis nomiĝi "La Internacia Universitato"kaj instigi la instruadon de Esperanto.Ĝi estas la sola en Usono,proponanta E-kursojn,por kiuj estas samtempe donata universitata rango.

## UTILIGU MEMORLETERON DE ĈEA !

En la 5-a numero de STARTO ni aperigis memorleteron al la ĉeĥaj esperantistoj sub la titolo "Ĉu ni agu por aŭ kontraŭ Esperanto?"

Ni atentigas insiste la gvidantojn de la rondetoj ne preterlasi tiun ĉi gravan informon kaj dokumenton pri la signifo de la membriĝo en la landa asocio kaj pri la avantaĝoj, kiuj per ĝi rezultas por ĉ i u j esperantistoj.

Utiligu dum viaj membrokunvenoj, laŭeble kiel unu el la ĉefaj programeroj lige kun serioza pridiskuto. Ĝi povas notinde helpi al la klerigo de via membraro en la organizaj aferoj de la tuta Esperanto-movado kaj kontribui per bona afertrafa argumentado por la kompleta membriĝo de viaj anoj en ĈEA, kion ni celas.

La Estraro de ĈEA

## ŜANCO EN LA "INTERVIZIO"

En Bulgario aperis gramofondiskoj kun kanzonoj en Esperanto de la kantistoj Mrgret Nikolova, Mimi Nikolova, E.Dimitrov, K.Semov kaj M.Zdravev. Oni povus okazigi koncerton de tiuj ĉi kantistoj enkadre de la elsendoj de la internacia televida organizaĵo "Intervizio" kondiĉe, ke la esperantistoj el Pollando, GDR, Hungario, Rumanio, Sovetunio kaj Ĉeĥoslovakio amase sendos leterojn en Esperanto al la Bulgara Televido, str. T. Straŝimirov 2 Sofio, Bulgario.

## INFANKONGRESETO PLI ALLOGA

La organizantoj de la 12-a Internacia Infana Kongreseto (30.7.- 6.8. 1971) bonvenigos la aliĝojn de malgrandaj lernejaj grupoj de diversaj landoj. Ili rezervigas 60 lokojn en la ĉambra lerneja feriocentro en Romney Marsh, Kent, Britujo, kiu situas 24 km de Dover. La partoprenontaj infanoj estos dividitaj laŭ la aĝo en tri grupojn : infanoj 6-9 jaraj, geknaboj 10-13 jaraj kaj gejunuloj 14-16 jaraj.

Alia novaĵo estas aldona libervola unusemajna restado (6.8.-13.8.) post la tradiciaj datoj de la kongreseto.

Diversnaciaj geinstruistoj de Esperanto estas petataj sin anonci, se ili estas pretaj deĵori dum unu aŭ ambaŭ semajnoj. Ili ricevus senpagan loĝadon kaj manĝadon, sed ne la vojaĝelspezojn. Interesitoj, skribu al Raif Markarian, 87 Sebastian Avenue, Shenfield, Essex, Britujo. Pliaj informiloj kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe UEA.

**14-a JARKUNVENO DE G.E.F.A**, okcidentgermana esp. fervojista asocio, realiĝis nunjare en Darmstadt inter la 10a kaj 11a de oktobro. Partoprenis ankaŭ eksterlandaj gastoj, delegitoj de fervojistaj E-asocioj el Francio, Aŭstrio, Svedio kaj Ĉeĥoslovakio; la lastan reprezentis s-ano J. Piŝtora.

## Poŝtmarkoj-konvena propagandilo

La E-klubo en Angers (Francio) kunlabore kun la loka filatela societo preparas ampleksan ekspozicion de p-markoj por la printempo 1971. Ĝi petas alilandajn kolektantojn sendi p.m. aŭ ties serion, prefere sur blanka papero, stampitan kaj konvene fiksitan.

Limdato por la ricevo de la sendoj: 1.3.1971 (s-ro A. Franguel, 42 rue du Pré-Pigeon 49-Angers, Francio.

## Esperantistaj kolektantoj !

Viajn bezonojn plene kontentigos ESPERANTISTA KOLEKTANTA CENTRO-INFORMEJO. EKCI celas precipe kolekti ĉiujn dokumentojn pri la uzado de Esperanto inter la kolektantoj, registri ĉiujn esp. kolektantojn kaj faciligi iliajn individuajn interrilatojn liverante taŭgajn adresojn al ĉiuj informpetantoj.

Gvidanto kaj fondinto : Raúl Melo, 15 rue de la Richelandiére 42, Saint Etienne, Francio, pĉk. Paris 1318.09.

Abonkotizo por Ĉeĥoslovakio : Kčs 18 (pagebla per neuzitaj PM).

## PAŜOJ AL PLENA POSEDO,

učebnice pro pokročilé, vyšla právě v těchto dnech. Cena za jeden výtisk jednotlivě je 25 Kčs, za 10 ks a více à 23 Kčs, za 25 ks a více à Kčs 21, nad 50 ks à 19 Kčs. Uvedené ceny platí od ledna 1971.

---

ODZNAKY PRO PŘÁTELE ESPERANTA,

t.j. pro ty, kdo s esperantem sympatizují, ale jazyk neovládají, vydal EK v Šumperku. Odznak je několikabarevný a ve dvou variantách, s nápisem:

"Amiko de Esperanto."

Cena 7 Kčs, při odběru 25 ks sleva à 0,50 Kčs, při odběru 50 ks à 1 Kčs.

Odznaky, jakož i dříve inzerované zpěvníky J. Cinka, objednávejte u J.V. O t t y, Vančurova 34, Šumperk.

KIO ESTAS ESPERMENSO ...?

Ĝi estas la nova internacia Esperanto-organizaĵo kun la celo antaŭenigi Esperanton inter Mensa-anoj kaj Mensa-on inter la esperantistoj. MENSA enlasas nur membrojn, kies nivelo de inteligenteco estas inter la plej altaj du procentoj da homoj. Ĝi havas ĉirkaŭ 18 000 membrojn en pli ol 60 landoj. Ĝiaj bazaj celoj estas esploroj en la kampoj de socioscienco kaj psikologio.

Pri ESPERMENSO pli detale informos Harry J. Lewis, Box 1322 North P.O., Halifax, N.S., Kanado.

---

Do sekretariátu ČES nahlížejí naši čtenáři namnoze přes archy potištěného papíru. Konkrétnější podobu pracoviště i těch, kteří se snaží po celý rok vyřídit agendu k spokojenosti všech příjemců, zachytil snímek dánského esperantisty E. Windeballeho. Na obr. adm. pracovnice L. Klegová a taj. P. Polnický.

— ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO —

Pli ol 3300 sciencistoj partoprenis la Sepan Mondkongreson de Sociologio en Varna, en septembro 1970. Inter ili estis ankaŭ D-ro W. Solzbacher kaj D-ro P.G. Forster, esperantistoj. Por la agema sekcio pri sociolingvistiko de la kongreso D-ro Forster, kiu estas ano de la Fakultato de Sociologio kaj Socia Antropologio de la Universitato en Hull, Anglujo, prelegis pri Esperanto kiel socia kaj lingvistika movado. La kunsidon, en kiu li prezentis sian raporton, prezidis D-ro U. Deŝeriev de la Lingvoscienca Instituto de la Sovetia Akademio de Sciencoj en Moskvo.

/The British Esperantist/

INFORMILO DE V.P.E.A

/Vjetnamia Pacdefenda Esperanto Asocio/, alportas en sia 19a n-ro partan tradukon en Esperanto de la DEKLARACIO de s-ino Nguyen Thi Binh ĉe la 84a plenkunsido de la Pariza Konferenco pri Vjetnamio /17.9.1970/.

## Okénko do sekretariátu



## Korespondi déziras

POLLANDO - Jozef TOMASZCZYK, 20j.oficisto,Miedzynesce, Dalne 78,pow.Bielsko-Biala,woj.Katovice,kolektas b.k.,p.m., esperantaĵojn,interŝ. E-librojn kaj revuojn.

SOVETUNIO - Jurij A. Sorokin USSR,Penzenskaja obl.,u. Kuzneck,str.Kalinina 244. Pri ĉs. filatelio,poŝtstampoj, maraj faŭno kaj flaŭro,astronomio,arkeologio,kosmo,arto.
Vida VALYTÉ,str.Vilnius 21, Pasvalys,Litovia SSR.

JAPANIO - f-ino Cisato TAKASIMA,344-487,Hodokubo,Hino-shi Tokio. Prefere kun junulo el Praha.

---

RICEVITAJ PERIODAĴOJ

Bulgara Esperantisto,septembro 1970 • Hungara Esperantisto,nov.,dec 1970 • Franca Esperantisto,nov.-dec.1970 • Informilo de VPEA,n-ro 19 • Universala Revuo,okt.1970 • Kvaronjara Bulteno de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto,sept.1970 • The British Esperantist,okt.1970 • Suplemento al "Nia Ligilo",9/1970 • Bulteno de EK Brno,n-ro 5 • Teknikista sekcio de ĈEA informas,okt.1970 • Zpravodaj sekce esperanta při námětové komisi českých filatelistů.

HEROLDO DE ESPERANTO abonebla por plua kvot-altigo.La jarabono 55.- Bv.kontakti la peranton I.Železný,p.k.7,Praha 56

Aŭskultu Esperantajn programojn de R A D I O R O M A!

La dissendoj okazas ĉiudimanĉe de 21,00 ĝis 21,20 /M.E.T./ Ondlongoj :

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| metroj | 30,90 | = | kHz | 9,710 |
| " | 41,24 | = | " | 7,275 |
| " | 50,08 | = | " | 5,990 |

---

Protesto de M.Jakubcová

Al neniu mi donis konsenton kaj permeson aperigi miajn versaĵojn en E-gazetoj eksterlandaj aŭ enlandaj.Bv.tion ne fari! Mi dankas vin pro komprenemo.

M.Jakubcová,Brno 15,Potácelova 70

KOREKTO. En la 4a numero ni skribis,ke la novelaro de Drda /Muta barikado/ aperis en la ĉina.Tamen ankoraŭ antaŭe ĝi aperis japanlingve.

---

ČTENÁŘŮM A SPOLUPRACOVNÍKŮM !!

Jak už bývá zvykem před koncem roku,ohlížíme se na chvilku i my za výsledky uplynulých dvanácti měsíců.Omlouváme se při této příležitosti za různé nedostatky /zejména četné tiskové a gramatické chyby v č.5/ a děkujeme za pomoc či za povzbudivé slovo...Malá prosba od nás : příspěvky a dopisy zasílejte pokud možno do konce každého lichého měsíce,a to na redakci STARTO,Praha 2,Blanická 4
A závěrem : na prahu roku 1971 přejeme všem českým a slovenským esperantistům hodně sil, dobré pohody a spokojenosti v práci. Věříme,že nám i nadále zachováte svou přízeň.

Redakce Starta

---

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio - vydává Český esperantský svaz,Praha 2,Blanická 4 - aperas dumonate-vychází každý druhý měsíc - rediguje-redaktas O.Knichal kun red. komitato-s red. radou : Ing.E.Felix,J.Mařík,Ing.F.Sviták.